WIKIPEDIA

Tventa dialekto

La **tventa** (tvente: *Twents* aŭ *Tweants*, nederlande: *Twents*) estas dialekto de la malaltsaksa lingvo. Ĝi estas parolata ĉiutage de proksimume 62 %[1] da loĝantoj de Twente, regiono en la nederlanda provinco Overiselo, apud la limo de Germanujo. Ne ekzistas norma tventa lingvo, ĉiu urbo kaj vilaĝo havas propran lokan varianton, sed homoj kiu parolas la tventan povas kompreni la aliajn variantojn. Tial homoj nomas la lingvon ne ĉiam la tventa, sed ofte uzas la nomon de la loka varianto. Multaj gepatroj nuntempe eduki iliajn gefilojn en la Nederlanda, tamen la aprecado de la lingvo kreskas dum la lastajn jarojn.

Tventa dialekto	
Tweants	
Parolata en	Nederlando
Denaskaj parolantoj	ĉ. 340 000 (2003)
Skribo	latina alfabeto
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Nederlando
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-3	twd
Glottolog	twen1241
Angla nomo	Tweants
Franca nomo	twents
Vikipedio	

Enhavo

Elparolo
- Vokaloj

Gramatiko
- Estanteco
- Estinteco
- Pluralo
  - Vira genro
  - Ina genro
  - Neŭtra genro
- Diminutivo kaj pluralo

Referencoj

Eksteraj ligiloj

Elparolo

La tventa ne havas norman elparolon aŭ ortografion; ĉiuj vilaĝoj havas sian propran lokan variaĵon.

Vokaloj

Monoftongaj fonemoj

	Antaŭa				Centra		Malantaŭa	
	malrondigita		rondigita		malrondigita		rondigita	
	mallonga	longa	mallonga	longa	mallonga	longa	mallonga	longa
Malvasta	i	iː	y	yː			u	uː
Preskaŭ malvasta	ɪ	ɪː	ʏ	ʏː				ʊː
Mezvasta	ɛ	ɛː	œ	œː	ə		ɔ	ɔː
Vasta					a	aː		

Diftongaj fonemoj

Komenca punkto	Fina punkto	
	Antaŭa	Malantaŭa
Preskaŭ malvasta	ɪi	
Duonvasta	ɛi	ɔu

Ekzemplaj vortoj por vokaloj

Mallonga				Longa			
Fonemo	**IFA**	**Ortografio**	**Signifo**	**Fonemo**	**IFA**	**Ortografio**	**Signifo**
/i/	/i/	*ie*	'vi'	/iː/	/ˈriːjə/	*riege*	'palisumi'
/y/	*ekzemplo bezonata*			/yː/	/byːl/	*buul*	'sako'
/u/	/hus/	*hoes*	'domo'	/uː/	/uːl/	*oel*	'strigo'
/ɪ/	/vɪs/	*vis*	'fiŝo'	/ɪː/	/kɪːnt/	*keend*	'infano'
/ʏ/	/ˈbrʏməl/	*brummel*	'rubusoj'	/ʏː/	/lʏː/	*leu*	'popolo'
				/ʊː/	/blʊːm/	*bloom*	'floro'
/ɛ/	/bɛk/	*bek*	'buŝo'	/ɛː/	/kɛːrk/	*keark*	'kirko'
/œ/	/lœs/	*lös*	'loza'	/œː/	/ˈɪːnlœːstɪx/	*éénlöastig*	
/ə/	/ˈbrʏməl/	*brummel*	'rubusoj'				
/ɔ/	/kɔp/	*kop*	'taso'	/ɔː/	/skɔːp/	*skoap*	'ŝafo'
/a/	/tak/	*tak*	'branĉo'	/aː/	/aːp/	*aap*	'simio'
/ɪi/	/nɪi/	*nij*	'nova'				
/ɛi/	/vlɛis/	*vleis*	'viando'				
/ɔu/	/slɔu/	*slouw*					

Gramatiko

Estanteco

Tvente	Esperante
ik lope	mi promensas
iej loopt	vi promenas
hee löp	li promenas
zee löp	ŝi promenas
wie loopt	ni promenas
ieleu loopt	vi promenas (plurale)
zee loopt	ili promenas

Estinteco

Tvente	Esperante
ik leupe	mi promenis
iej leupn	vi promenis
hee leup	li promenis
zee leup	ŝi promenis
wieleu leupn	ni promenis
ieleu leupn	vi promenis (plurale)
zee leupn	ili promenis

Pluralo

La formo de pluralaj substantivoj dependas de la genro de la vorto. La tventa havas 3 genrojn: *vira*, *ina* kaj *neŭtra*.

Vira genro

La pluralo por viraj vortoj ĝenerale estas farita per aldono de umlaŭto kaj vortfina -e al la substantivo.

Tvente	Esperante
eenn hoond	unu hundo
twee heunde	du hundoj

Ina genro

La pluralo por inaj vortoj ĝenerale estas farita per aldono de vortfina -n al la substantivo.

Tvente	Esperante
ene komme	unu bovlo
twee komn	du bovloj

Neŭtra genro

La pluralo por neŭtraj vortoj ĝenerale estas farita per aldono de vortfina -er al la substantivo.

Tvente	Esperante
een keend	unu infano
twee keender	du infanoj

Se la neŭtra substantivo havas malantaŭan vokalon, ĝi ankaŭ ricevas umlaŭton kaj -*er*.

Tvente	Esperante
een book	unu libro
twee beuker	du libroj

Diminutivo kaj pluralo

Tvente	Esperante
een kumke	unu bovleto
twee kumkes	du bovletoj

Referencoj

1. ↑ Bloemhoff, H. et al. Taaltelling Nedersaksisch: Een enquête naar het gebruik en de beheersing van het Nedersaksisch in Nederland. Groningen: Sasland (2005). 39-40.

Eksteraj ligiloj

- Fonetiko de la tventa (http://members.ziggo.nl/twunn/)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tventa_dialekto&oldid=6176379"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 00:30, 25 jun. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.